

Hans Leip,
Lili Marleen

tradukita de S. A. Jacobsson

Brilis lampo hele
ĉe kazerna pord',
lumis ĝi fidele
en ĉiutaga ord'.
Sur trotuara ŝton-eben'
renkontas vin mi dum promen'
kun ĝoj', Lili Marleen.

Ni premiĝis kune,
manon tenis man',
ŝtelis mi sublune
kiseton el Nirvan'.
Kaj siblis vent' kun akra pen',
sed brilis lamp' por nia ben'
ni du, Lili Marleen.

Vokas la gardisto:
- Eniru, jen signal'!
Ne helpas la rezisto,
ĝi gvidas al fatal'.
Kun pez' mi paŝas al kusen',
sub lamp' mi restus en katen'
de vi, Lili Marleen.

...

.....

Mi en koro ardas
 pro sopir' al vi,
 reve vin rigardas
 kaj ĉarme ridas vi.
 Tra la kuraĝa larm-reten'
 dum ĝis revid' en lamp-seren':
 do ĝis, Lili Marleen!

*Traduko de la Germana poemo "Lili Marleen" de HANS LEIP (*1893 – †1983) en Esperanton de S. A. Jacobsson.*

Arg-537-1070 (2010-05-03 18:37:50)

Tiu ĉi traduko aperis en 1942 en la sveda Esperanto-revuo "Svenska Esperanto-Tidningen / La Espero", n-ro 12 de decembro 1942. Mi, Manfred Retzlaff, transprenis ĝin el la reta kolekto <http://literaturo.dk>, kiun kunmetas la dana s-ano Lars Kromann. Vidu rekte sub <http://literaturo.dk/lili.htm>.